




3·90 * 138*

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO





KORESPONDI JEZIROJ ANONCOJ

15-jara studentino de gimnazio interesigas pri fremdaj lingvoj, muziko, sporto kaj legado. Ŝi satas korespondi kun foraj landoj, ekz. Japanio, Ĉinio, Finnlando, Svedio. Adreso: Pavlína Stachová, CS-391 72 Sudoměřice u Bechyně 37, Ĉeĥoslovakio

21-jara planistino en masinentrepreno interesigas pri vojaĝado, lernado de fremdaj lingvoj, literaturo kaj manlaboroj. Adr.: Alena Mašková, CS-687 33 Hradčovice 151, okr. Uherské Hradiště, Ĉeĥoslovakio.

17-jara fraŭlino interesigas pri diversaj temoj: Esperanto, fremdaj lingvoj (rusa, germana, angla), literaturo, turismo, muziko, interpopolaj rilatoj. Adr.: Iglíka Cokova, Lenin 5A-8, Stara Zagora, 6000, Bulgario.

53-jara instruistino deziras korespondi kun ĉeĥaj esperantistoj. Ŝi interesigas pri turismo, literaturo kaj folkloro. Adr.: Sabina Mucha, Zborow - skola, 98-170 Widawa, Pollando.

42-jara pola e-isto volas konatigi kun juna e-istino (aĝo 25 - 35), korespond-temoj: amikeco, amo. Li estas juristo kaj instruisto, interesigas pri libroj kaj vojaĝoj. Adr.: Mgr. Kazimierz Małek 58-105 Świdnica SI., ul. Dąbrowskiego 79/2 Pollando.

17-jara lernantino de teknikumo interesigas pri turismo, tre satas bestojn kaj vegetalojn. Adr.: Marta Busko, 15-507 Białystok, ul. Kajki 41, Pollando.

49-jara flegistino, fraŭlino, interesigas pri turismo. Adr.: Irena Gasionowska, ul. Sztormowa 1 A/17, 80-335 Gdansk, Poll.

Nova e-isto volas havi geomikojn en Ĉeĥoslovakio. Adr.: Vladimír Ĥrenov, Rjazanskij prospekt d. 5, l. 134, 109391 Moskva, USSR.

30-jara seruristo en kemia fabriko volas korespondi kun amikino el Ĉeĥoslovakio. Li interesigas pri fremdaj lingvoj, precipe slavaj, rokmuziko kaj E-movado. Li korespondas ĉeĥe, slovake aŭ esperantlingve. Adr.: Sergej Golovenkov, USSR, SU-466200, Kazahio, urbo Ŝevĉenko, kvartalo 27, domo 32, loĝejo 83.

40-jara inĝeniero deziras korespondi tutmonde pĉt, ankaŭ pri vojaĝoj kaj gastado. Adr.: Anatolo Guk, 347900 Taganrog, Rostovskoj obl., glavpocĉamt, ab.k. 43, Soveta Unio.

47-jara italo korespondas pri poŝtmarkoj, bildkartoj, historio kaj ajnaj temoj. Adr.: Romano Morelli, Via Cantore, 8, 20052 Monza, Prov. (Milano), Italio. Li konas ankaŭ la anglan lingvon.

Ni gratulas

Jaroslava Rajtrová kaj Ing. Jaroslav Liška geedzigis la 9-an de februaro 1990 en la Nacia Komitato en Praha 4. Gratulon al la novgeedzoj kaj elstaraj sportistoj-nagantoj!



Longjara membrino de la E-klubo en Hradec Králové a-ino B. Weinerová atingis la 29-an de aprilo 1990 la 95-an naskigjubileon. Ŝi estas spirite vigla, diliĝente legas E-revuojn, tradukas interesajn artikolojn kaj kroctrikas belegajn etaĵojn. Lau sia ebleco ŝi partoprenas la E-vivon. La klubanoj el Hradec Králové deziris al ŝi daŭran sanon kaj kontentecon en la E-familio kaj en la medio de propraj familianoj. (E. Kánská)

Prezidento Václav HAVEL

La nova prezidento de Ĉeĥoslovaka respubliko Václav Havel naskigis la 5-an de oktobro 1936 en Prago. En la jaro 1951 li finis la devigan lernejon, kaj ĉar li devenis el fama praga entreprenista familio, li ne rajtis studi. Kvar jarojn li laboris kiel metilernanto-kemia laboratoriano kaj samtempe li trapasis vesperan gimnazion. Ekde sia 20-a jaro li publikigis studaĵojn kaj artikolojn en literaturaj kaj teatraj revuoj. La kultura tradicio, propra al lia familio, orientis lin al humanismaj valoroj de la ĉeĥa kulturo, kiuj en la 50-aj jaroj estis subpremataj.

Pro kadraj kialoj li ne estis akceptita en humanismajn lernejojn, kaj tial li studis dum du jaroj teknikan altlernejon kaj du jarojn li soldatservis. Post la servo li laboris kiel sceneja teknikisto, unue en Teatro ABC kaj ekde la jaro 1960 en Teatro Ĉe Balustrado. En tiu ĉi teatro estis realigitaj liaj unuaj teatraĵoj, inter kiuj la principan lokon havis la ludo Ĝardeno solenaĵo (1963). La teatraĵo farigis karakteriza reprezentanto de forta renaskiga tendenco en la ĉeĥa arto kaj en la ĉeĥa socio. Tiu ĉi tendenco kulminis en la jaro 1968 per la Praga Printempo, en kiu V. Havel partoprenis ne nur kiel matura aŭtoro de pluaj teatraĵoj Memorando (1965), Malfaciligita ebleco de koncentriĝo (1968), sed ankaŭ kiel reprezentanto de demokrataj imagoj pri la ĉeĥaj kulturo kaj socio. Post la falo de la Praga Printempo, frakasita per la invado de kvin ŝtatoj de Varsovia Traktato, V. Havel persistis en siaj opinioj. Liaj teatraĵoj, pli fruaj kaj novaj, estis en Ĉeĥoslovakio daŭre malpermesitaj.

La monda reputacio de V. Havel komencigis jam en la 60-aj jaroj, en la jaroj 70-aj kaj 80-aj ĝi plu vastigis kaj profundigis. Sed V. Havel en tiuj ĉi jaroj manifestigis ankaŭ kiel civitano. Li protestis kontraŭ la ĝenerala subpremo, karakteriza por la jaroj de t. n. normaligo, kaj farigis unu el la fondintoj kaj la unua el la tri porparolantoj de civitana iniciato Ĉarto 77. Li estis trifoje arestita, entute li pasigis en malliberejo proksimume kvin jarojn. En tiu tempo ekestis novaj teatraĵoj Almozula opero (1972), Audienco (1975), Vernisaĵo (1975), Protesto (1978), Largo desolato (1984), Tinto (1985), Asanacio (1987), sed ankaŭ la mondkonata libro da korespondaĵoj el malliberejo Leteroj al Olga kaj tri esaj verkoj.

La brava rezisto de Havel kaj ankaŭ la rezisto de centoj de liaj amikoj kulminis en la fino de la jaro 1989. V. Havel farigis la ĉefa reprezentanto de la nove estiĝinta renoviga movado Civitana Forumo. En decembro 1989 li estis elektita ĉefo de la nova Komunumo de verkistoj.

Pro siaj verkoj kaj ankaŭ pro la aktiveco de batalanto por homaj rajtoj V. Havel estis premiita per gravaj internaciaj premioj, i. a. per premio de Erasmo de Roterdamo (1986), per Pacpremio de germana libromarkato (1989), per premio Olof Palme (1989) kaj per premio D-ro K. Renner (1989).

S-ro Václav Havel personigas la esperojn de ĉiuj ĉeĥoj kaj slovakoj pri la vivo en demokrata kaj libera ŝtato.

Novjara deklaro de la ĉeĥoslovaka prezidento
la 1-an de januaro 1990-a j.

Karaj ŝtatanoj, dum kvardek jaroj vi aŭskultadis en tiu tago el buŝoj de miaj antaŭintoj en diversaj varietoj la samon: kiel nia lando floras, kiom da novaj milionoj da tunoj de ŝtalo ni estis fabrikintaj, kiel ni ĉiuj estas feliciaj, kiel ni fidas al nia registaro kaj kiel belaj perspektivoj montriĝas antaŭ ni. Mi supozas, ke vi ne proponis min por tiu ofico tial, ke ankaŭ mi mensogu al vi.

Nia lando ne floras. Granda kreiva kaj spirita potencaro de niaj popoloj ne estas eluzita sencoplene. Tutaj fakoj de industrio fabrikas aĵojn, kiujn ni ne bezonas, dum tio, pri kio estas intereso, mankas al ni. Ŝtato, nomanta sin ŝtato de laboristoj, malhonorigas kaj ekspluatas laboristojn. Nia malnoviginta ekonomio malsparas energion, kiun ni posedas malmulte. Lando, kiu povis esti fiera en pasinteco pri klereco de sia popolo, elspezas por klerigado tiom malmulte, ke ni situas en la sepdekdua rango en la mondo. Ni neniiĝis niajn kampojn, riverojn kaj arbarojn, kiujn al ni estis testamentintaj niaj prauloj kaj ni havas nun plej malbonan vivmedion en la tuta Eŭropo. Plenkreskaj homoj mortas pli frue ol en pliparto de eŭropaj landoj.

Permesu al mi etan personan travivaĵon. Vojaĝante aviadile ĝis Bratislava mi trovis inter diversaj traktadoj eblecon rigardi de fenestro. Mi vidis komplekson de nafta fabriko kaj tuj apud ĝi la grandkvartalon Petržalka. Tiu rigardo suficis al mi, por ekkompreni, ke niaj ŝtataj kaj politikaj ĉefoj dum dekoj da jaroj ne rigardis aŭ ne volis rigardi ec de fenestroj de siaj aviadiloj. Neniu legado pri statistikoj, kiuj estas por dispono, ne ebligus pli rapide ekkompreni la ŝtaton, en kiu ni estigis.

Sed ĉio ĉi ankoraŭ ne estas la ĉefafero. Malplej bone estas, ke ni vivas en difekta morala medio. Morale ni ekmalsanis, ĉar ni alkutimigis diri ion alian kaj pensi ion alian. Ni ellernis fidi pri nenio, ne atenti unu alian, zorgadi nur pri ni mem. Ideoj kiel amo, amikeco, kompato, humilo, ec pardono perdis sian profundecon kaj dimension kaj por multaj inter ni signifas nur iajn psikologiajn specialecojn aŭ montriĝas kiel erarvenintaj salutoj el longpasintaj tempoj, iom ridindaj en epoko de komputiloj kaj kosmaj rakedoj. Nur malmultaj inter ni kapablis laute voki, ke potenculoj ne estu cionpovaj, kaj ke specialaj bienoj, kiuj produktas por ili ekologie purajn kaj kvalitajn nutraĵojn, estu sendontaj la produktaĵojn al lernejoj, infanaj logdomoj kaj malsanulejoj, se nia terkulturado ne povas ankoraŭ prezenti ilin al ĉiuj. Ĝisnuna reĝimo armita per sia aroga kaj netoleranta ideologio malhonorigis homon al produkta forto kaj naturon al produkta ilo. Ĝi atakis tiel ties esencon mem kaj ties reciproke rilaton. El talentaj kaj plenrajtaj homoj, intelekte mastrumantaj en sia lando, ĝi faris sraubetojn de ia ekstreme granda, brueganta kaj odoracanta meka-

nismo, pri kiu neniu scias, kian sencon ĝi havas. Ĝi kapablas nenion alian ol nur foruzi sin mem kaj ĉiujn siajn sraŭbetojn malrapide.

Se mi parolas pri difektita morala medio, do mi ne opinias nur ĉefulojn, kiuj mangas ekologie purajn legomojn kaj ne rigardas de aviadilaj fenestroj. Mi parolas pri ni ĉiuj. Ni ĉiuj nome alkutimigis pri la diktatoreca sistemo kaj opiniis ĝin nesangebla fakto kaj tiel konservis ĝin fakte. Per aliaj vortoj: ni ĉiuj estas respondecaj, kompreneble ĉiu en alia skalo, por la funkciado de la diktatoreca mekanismo, neniu estas nur ties viktimo, sed ni estas ĉe ties kunformantoj.

Kial mi parolas pri tio: estas tre malprudente kompreni la tristan heredaĵon de lastaj kvardek jaroj kvazaŭ io fremda, kion testamentis al ni fora parenco. Kontraŭe ni bezonas preni tiun heredaĵon kiel ion, kion ni mem allasis kontraŭ ni. Se ni prenas tion tiel, do ni elkomprenas, ke dependas nur de ni, ke ni rebonigu tion. Por ĉio akuzi nur eksajn estrojn ni ne povas nur tial, ke tio ne estus lau vero, sed ĉe tial, ĉar tio povus malfortigi la devon, kiu hodiaŭ staras antaŭ ni ĉiuj, nome devo agi memstare, libere, prudente kaj rapide. Ni ne estu en eraro: ĉia ajn registaro, parlamento aŭ prezidento ne kapablas multe solaj. Kaj estus eĉ nepre malbone postuli la tutan rebonigon nur de ili. Libereco kaj demokratio estas ja partopreno kaj tial kunrespondeco de ĉiuj.

Se ni konsciigas pri tio, do tuj ĉiuj teruroj, kiujn la nova ĉeĥoslovaka demokratio heredis, cesas aperi tiel teruraj. Se ni konsciigas, do espero revenos en niajn korojn. En rebonigado de komunaj aferoj ni povas apogi nin pri io. Lasta tempo kaj precipe lastaj ses semajnoj de nia trankvila revolucio montris, kiel granda komune humana, morala kaj spirita forto kaj kiel granda civitana kulturo dormetis en nia socio sub enrudita magko de apatio. Kiam ajn iu kategorie asertis pri ni, ke ni estas tiaj aŭ aliaj, mi ĉiam kontraŭdiris, ke socio estas tre mistera formaĵo kaj ke oni ne povas nur kredi tiun fizionomion, kiu estas ĵus montrata. Mi estas felica, ke mi ne eraris. Ĉie en la mondo homoj miras, kie en tiu subigitaj, malhonorigitaj, skeptikaj kaj saĝe pri nenio fidantaj civitanoj de Ĉeĥoslovakio aperis tiu mirinda forto, kiu dum ion da semajnoj per gentila kaj pacama maniero kapablis forigi la diktatorecan sistemon de siaj sultroj. Mi mem miras pri tio. Kaj ni demandas: de kie propre junaj homoj, kiuj ne konsis alian sistemon, cerpas sian sopiron pri vero, sian mensliberon, sian politikan fantazion, sian ŝtatanan kuragon kaj ŝtatanan prudenton? Kiel eble, ke eĉ ties gepatroj, do precize generacio opiniata perdita, aligis al ili? Kiel estas eble, ke tiom da homoj tuj ekkonis, kion fari kaj neniu bezonis konsilojn aŭ instrukciojn?

Mi opinias, ke tiu esperplena mieno de la nuntempa situacio havas du ĉefajn kaŭzojn: homo nome antaŭcio neniam estas nur produkto de ekstera mondo, sed ĝi ĉiam estas kapabla rilati al io pli supera, eĉ se tiun kapablon la ekstera mondo sistemege neniiĝus. Due estas tial, ĉar humanaj kaj demokrataj tradicioj, pri kiuj oni ofte vane babilis, tamen ie en subkonscio de niaj nacioj kaj naciecoj dormetis kaj kase estis transportataj de unu generacio al alia, por ke en gusta momento ĉiu el ni trovu ilin en si, kaj sangu ilin al faktoj.

Por nia nuna libereco ni estis eĉ pagontaj. Multaj niaj ŝtatoj pereis en la kvindekaj jaroj en arestejoj, multaj estis ekzekutitaj. Miloj da homaj vivoj estis neniigitaj, centmiloj da talentaj homoj estis elpelitaj eksterlanden. Persekutataj estis tiuj, kiuj dum la milito savis honeston de niaj nacioj, tiuj kiuj kontraŭstaris la diktatorecan registaron, eĉ tiuj, kiuj kapablis esti propraj kaj pensi libere. Nenion, kiu por nia libereco tiel aŭ aliel pagis, oni forgesu. Sendependaj tribunaloj ĵuste decidus pri kulpo de tiuj, kiuj respondecas por tio, por ke plena vero pri nia ĵusa pasinteco aperu.

Sed ni ne povas forgesi eĉ tion, ke aliaj nacioj pagis por la nuna libereco ankoraŭ pli kruele kaj tiel nerekte eĉ anstataŭ ni. Riveroj sangaj, fluintaj en Hungario,

Polio, Germanio kaj antaŭ nelonge per terura maniero en Rumanio, samkiel sango, kiun elversigis nacioj de Sovetio, ne estas forgesendaj antaŭ ĉio tial, ĉar ĉia homa turmentado tutas ĉiun homan eston. Sed ne nur tial: ili ne estas forgesendaj tial, ĉar tiuj grandaj oferoj estas tragika fono de nuna libereco aŭ sekva liberigado de nacioj en soveta bloko, do ankau la fono de nia ĵus akirita libereco. Sen sangoj en Sovetio, Polio, Hungario kaj Germana Demokratia Respubliko malfacile venus ĉe ni tio, kio venis, kaj certe ne okazus en tia trankvila karaktero.

Ke ni havis favorajn internaciajn kondiĉojn, do tio ne signifas, ke iu dum tiuj semajnoj helpis nin. Dum jarcentoj niaj nacioj propre rektigis mem, ili ne apogis sin pri ia helpo de pli potencaj statoj aŭ grandpotencoj. Ŝajnas al mi, ke en tio estas grava morala riceco de tiu tempo: ĝi havas en si esperon, ke venonte ni ne suferos pro sento, ke ni estu dankemaj ĉiam al iu pro io. Nun dependas nur de ni, ĉu tiu espero realigos kaj ĉu historie novmaniere aperos nia statana, nacia kaj politika memfido. Memfido ne estas arogeco.

Tute kontraŭe: nur homo aŭ nacio en plej bona vortosenso memfidema kapablas aŭskulti vicojn de aliaj, preni ilin kiel memegalajn, pardonon al siaj malamikoj kaj bedaŭri siajn kulpojn. Ni provu tiel komprenatan memfidon enporti kiel homoj en nian statan vivon kaj kiel nacioj en nian konduton sur la internacia sceno. Nur tiel ni trovos ree respekton al ni mem, al ni reciproke, respekton de aliaj nacioj. Nia stato neniam estu aldono aŭ malrica parenco de iu alia. Ni devas ja multe preni de aliaj, multon lerni, sed ni povas fari tiel post longa tempo kiel egalvaloraj kunuloj, kiuj povas ankau ion prezenti.

Nia unua prezidento skribis: Jesuo, ne Caesar. Per tio li daŭrigis la ideojn de Chelický kaj Komenio. Hodiaŭ tiu ideo ree vivigis en ni. Mi povas aserti, ke ni eĉ povas disvastigi ĝin kaj enporti en la eŭropan kaj tutmondan politikon novan elementon. El nia lando, se ni volos, jam sencese brilos ano, sopiro pri interkompreno, forto de spirito kaj ideo. Tiu brilado povas esti precize tio, kion ni povas prezenti kiel nian specialan kontribuon al la tutmonda politiko. La unua prezidento Masaryk bazigis la politikon en moraleco. Ni provu en nova tempo novmaniere renovigi tiun koncepton pri la politiko. Ni instruu nin mem kaj aliajn, ke politiko estu esprimo de sopiro kontribui al feliĉo de civito kaj ne intenco trompi aŭ perfortigi la civiton. Ni instruu nin mem kaj aliajn, ke politiko ne estu nur arto de eblaj aferoj, precipe se oni pensas per tio spekulaciojn, kalkulojn, intrigojn, sekretajn paktojn kaj pragmatajn manovrojn, sed ĝi estu eĉ arto de neeblaj aferoj, nome arto fari pli bonajn nin mem kaj la mondon.

Ni estas malgranda lando, sed tamen ni iam estis spirita kruciĝo de Eŭropo. Kial ni ne povus ree esti tio? Ĉu ne estus plua riceco, per kiu ni povus al ceteraj kompensi helpon, kiun ni bezonas de ili?

La enlanda mafio de tiuj, kiuj ne rigardas de fenestro de siaj aviadiloj kaj mangas speciale bredatajn porkojn, ja vivas kaj strebas malfaciligigi la vivon, sed ĝi ne estas plu la cefa malamiko. Tion malpli estas la internacia mafio. Nia plej granda malamiko estas nun niaj propraj malbonaj ecoj. Indiferenteco al komunaj aferoj, vanteco, ambicio, honorarvido, memamo kaj rivaleco. En tiu sfero nin atendas nur la cefa batalo.

Antaŭ ni estas libera balotado kaj tial antaŭbalota lukto. Ni ne permesu, ke tiu lukto malpurigu ĝis nun puran mienon de nia milda revolucio. Ni malhelpu tion, ke ni simpatiojn de la mondo, kiujn ni tiel rapide akiris, same rapide perdu tial, ĉar ni implikiĝos en luktado por potenco. Ni ne permegu, ke sub nobla vualo de sopiro servi aferojn komunajn ree ekfloru nur sopiro servi ĉiu nur sin mem. Nun ne temas ja nur pri tio, kiu partio, kiu klubo aŭ grupo venkos en balotado. Nun temas nur pri tio, ke en ĝi venku, sen respekto de siaj partiaj legitimiloj, nur tiuj morale, statane, politike, fakte la plej bonaj el inter ni. Venonta politiko kaj prestiĝo de nia stato

dependos de tio, kiajn personecojn ni elektos kaj alfine voĉdonos por niaj reprezentantaj estraroj.

Karaj ŝtatanoj, antaŭ tri tagoj mi fariĝis laŭ via volo, interpretata de deputitoj en la federacia parlamento, prezidento de la respubliko. Vi do laŭrajte atendas, ke mi mencias pri taskoj, kiujn mi vidas antaŭ mi kiel via prezidento.

La unua el ili estas eluzi ĉiujn miajn povojn kaj mian influon al tio, ke ni baldaŭ kaj serioze venu al balotaj urnoj en libera balotado kaj ke nia vojo al tiu historia limstono estu deca kaj trankvila.

Mia dua tasko estas atenti, ke ni al tiu balotado venu kiel du fakte samrajtaj nacioj, kiuj reciproke ŝatas siajn interesojn, naciajn individuecojn, religiajn tradiciojn kaj siajn simbolojn. Kiel ĉeĥo en ofico de prezidento, kiu ĵuris en la manojn de signifa kaj al mi proksima slovakoj, mi sentas post malbonaj spertoj, kiujn slovakoj travivis en pasinteco, specialan devon respekti tion, ke oni atentu ĉiujn interesojn de la slovakaj nacio kaj ke en estonteco ĝi havu eblecon al ĉiu ŝtata funkcio, eĉ al plej supera.

Mian trian taskon mi opinias subteno de ĉio, kio kondukas al pli bona situacio de infanoj, virinoj, malsanuloj, maljunaj homoj, klopode laborantaj, anoj de naciaj malplimulto kaj nepre ĉiuj ŝtatanoj, kiuj pro kiaj ajn kaŭzoj fartas malpli bone ol ceteraj. Neniam pli bonaj nutraĵoj aŭ malsanulejoj povas esti nur por potenculoj, sed estu prezentitaj al tiuj, kiuj plej multe bezonas ilin.

Kiel ĉefa estro de armeo mi volas esti garantio, ke defendkapablo de nia ŝtato por neniu estos preteksto, ke tiu malebligu pacajn iniciativojn, ekzemple kurtigon de soldatdeĵorado, anstataŭan soldatdeĵoron kaj entute humanecon de soldata vivo.

En nia lando estas multaj arestatoj, kiuj ja grave kulpigis kaj estas tial punitaj, sed ĉiuj estis travivintaj, eĉ kontraŭ bona volo de iuj esploristoj, ĵuĝistoj kaj antaŭ ĉio advokatoj, justicon falsigitan, kiu limigis iliajn rajtojn, kaj devas vivi en arestejoj, kie oni ne strebas vekti tion pli bonan, kio estas en ĉiu homo, sed male oni homojn humiligas kaj nenigas korpe kaj psike. Sciante pri tiu fakto mi decidis deklari relative vastan amnestion. La arestatoj ni samtempe informas, ke ili komprenu, ke kvardek jarojn de malbona esplorado, jugado kaj arestado ne estas eble forigi dum unu tago kaj ke ili komprenu, ke rapide preparataj manoj tamen postulas ian tempon. Per ribeloj ili helpas nek la socion nek sin mem. La publikon mi petas, ke ĝi ne timu la forlasitajn arestatojn, ke ĝi ne malbonigu ilian vivon kaj helpu ilin en kristana senco post ilia reveno inter nin, trovi en si tion, kion ne kapablis trovi en arestejoj: kapablon pri pentofaro kaj sopiron vivi laŭorde.

Mia honesta tasko estas plifortigi la gravecon de nia lando en la mondo. Mi dezirus, ke aliaj ŝtatoj estimu nin tial, ĉar ni montris komprenon, toleremon kaj amon al paco. Mi estus felica, se ankoraŭ antaŭ la balotado, eĉ nur por unu tago, vizitus nian landon papo Johano Paulo la Dua kaj dalaĵlamao de Tibeto. Mi estus felica, se estus plifortigitaj niaj amikaj rilatoj al ĉiuj nacioj. Mi estus felica, se ankoraŭ antaŭ la balotado ni ekligus diplomaciajn rilatojn kun Vatikano kaj Israelio. Al la paco mi volas kontribui eĉ per morgaŭa mallonga vizito de niaj du reciproke parencaj najbaroj, nome Germana Demokratia Respubliko kaj Federacia Respubliko Germanio. Mi ne forgesos eĉ niajn aliajn najbarojn, fratecan Polion kaj al ni ciam pli proksimajn Hungarion kaj Aŭstrion.

Alfine mi satus diri, ke mi volas esti prezidento, kiu malpli multe parolas, sed pli multe laboros. Prezidento, kiu ne nur bone rigardos de fenestroj de sia aviadilo, sed kiu, precipe, estos ciam inter siaj ŝtatanoj kaj bone auskultos ilin.

Eble vi min demandas, pri kia respubliko mi revas. Mi respondos al vi: pri respubliko memstara, libera, demokratia, pri respubliko bone ekonomie prosperanta kaj sam-

tempe sociale justa, koncize pri respubliko humana, kiu servas la homon kaj povas tial esperi, ke la homo servos ĝin. Pri respubliko de ĝenerale kleraj homoj, ĉar sen ili neniu nia problemoj estas solvebla. Nek homa, nek ekonomia, nek ekologia, sociala, nek politika.

Mia plej signifa prezidenta antaŭulo malfermis sian unuan manifeston per citaĵo el Komenio. Permesu al mi, ke mi finu mian unuan deklaron per parafrazo de la sama citaĵo:

Via regado, popolo, revenis al vi!

(Tradukis Josef Chvosta)

Václav HAVEL:

MEMORANDO

(La teatraĵo estas akra satiro pri la burokratio, kiu regas nian socion. Por pli bone funkcii, la burokratio formis artefaritan lingvon "ptydepe", per kiu ĝi povas pli bone praktiki sian regadon. Jen ni prezentas la duan bildon el la teatraĵo. - La red.)

Dua bildo.

La instruejo de ptydepe: en la fono katedro, en la antaŭa parto de la scenejo kvar seĝoj. Malantaŭ la katedro staras Perina kaj lektias al kvar oficistoj, sidantaj sur la seĝoj dorsflanke al la publiko. Inter ili estas Kalous.

PERINA: Ptydepe, kiel vi scias, estas lingvo sinteza, konstruata sur la severe scienca fundamento, kun maksimume racia gramatiko kaj neordinare ampleksa vortprovizo. Ĝi estas lingvo absolute ĝzaktata, kapabla multe pli precize ol kiu ajn ordinara lingvo esprimi ĉiujn ĝubtilajn formulnuancojn de gravaj oficialaj tekstoj. Rezulto de tiu ĉi precizeco estas kompreneble eksterordinara komplikiteco kaj malfacileco de ptydepe: atendas vin multaj monatoj de intensa laboro, kiu povas esti kronata per sukceso nur tiam, kiam vi apogos vin je la diligenteo, persistemo, disciplino, talento kaj memorkapablo. Kaj memkompreneble je la kredo - sen la nerompebla kredo je ptydepe ankoraŭ neniu iam ellernis ptydepe-on. Kaj nun koncize al iuj bazaj principoj de ptydepe: la naturaj lingvoj ekestis, kiel konate, spontane, nekontrolite, tiel dirite nesciencie, kaj ilia strukturo estas do certasence verdire diletanta. Por la oficialaj kontaktoj la plej grava manko de la naturaj lingvoj estas krom tio la nefidindeco, rezultanta el manko de unusenceco kaj neintersangebleco de iliaj fundamentaj konstruunuoj - la vortoj. Vi ĉiuj scias, ke ĉe la natura lingvo sufiĉas ofte anstataŭigi unu literon per alia (herbo - cerbo, bovo - povo) aŭ simple unu literon forpreni (razeno - azeno) kaj sangigas la kompleta signifo de la vorto. Kaj krome mi ne forgesu la

homonimojn: kiom da malagrablajoj en la oficialaj kontaktoj povas kaŭzi, kiam du vortoj kun malsamaj signifoj estas skribataj egale (sen-toma - sent-ema) aŭ preskaŭ egale (kaj' - kaj). La celo de ptydepe estas per celkonscia limigo de ĉiuj reciprokaj similaĵoj inter la vortoj garantii al ĉiu sciigo tian gradon de precizeco, fidindeco kaj unusenco, kiu estas atingebla en neniu natura lingvo. Ptydepe estas konstruita laŭ jena premiso: se la vortoj devas kiel eble plej malmulte simili unu al alia, ili devas esti kreataj per kiel eble malplej probableaj kombinaĵoj de literoj, kio signifas, ke la kreado de vortoj devas esti farata laŭ tiuj principoj, kiuj kondukas al la plej alta ebla redundanco de la lingvo. Redundanco ja - kiel diferenco de la maksimuma kaj efektiva entropio, rilatigita al la maksimuma entropio kaj esprimita en procentoj - trafe prezentas ĝuste tiun superfluaĵon, je kiu estas la esprimo de la certa informo en la koncerna lingvo pli longa kaj sekve malpli probable, ol estus ĝia esprimo en lingvo kun maksimuma entropio, en kiu lingvo ĉiuj literoj havas la saman probablecon de la trovigo. Koncize dirite: ju pli grandan redundancon havas la lingvo, des pli fidinda ĝi estas, ĉar des pli malgranda estas la danĝero, ke per sango de litero, per misrigardo aŭ mistaĵo estos sangita la signifo de la teksto.

Kiamaniere ptydepe konkrete atingas sian altan redundancon? Simple: per konsekvenca apliko de la tiel nomata principo de sesdekprocenta nesimileco, kio signifas, ke kiu ajn ptydepe-a vorto devas diferenci minimume per sesdek procentoj de siaj literoj disde kiu ajn alia samlonga ptydepe-a vorto, krome kiu ajn ĝia parto devas sammaniere diferenci disde kiu ajn ptydepe-a vorto samlonga, t.e. de kiu ajn pli mallonga vorto ol tiu, kies parto ĝi estas. Do ekzemple el ĉiuj kvinliteraj kombinaĵoj de la dudek ses literoj de la alfabeto, kiuj estas entute 11 881 376, eblas elpreni 432 kombinaĵojn, diferencantaj reciproke per tri literoj, t.e. per sesdek procentoj el la tuta nombro. El tiuj Ĝi 432 kombinaĵoj 17 ple-nomas ankau la ceterajn kondicojn kaj formas do la ptydepe-ajn vortojn. El tio estas ankau klare, kial en ptydepe trovigas ofte ankau tre longaj vortoj.

KALOUS (mananocas sin): Mi petas -

PERINA: Bonvolu -

KALOUS (starigas): Ĉu vi povus diri al mi, kiu estas la plej longa ptydepe-a vorto? (Li eksidas)

PERINA: Certe. Ĝi estas esprimo por cipsele rivera, kiu havas 319 literojn. Sed plue: kiel ptydepe solvas la problemon de klareco kaj prononceblo de tiom longaj vortoj? Simple: la literoj estas trametataj ankau interne de la vorto ie kaj tie per interspacoj tiel, ke la vorto estas formata tiamaniere verdire de certa pli aŭ malpli granda nombro de tiel nomataj subvortoj. Sed ankoraŭ krome ec la vortlongo - kiel cetero nenio en ptydepe - ne estas hazarda. La vortprovizo de ptydepe ja estas konstruata laŭ tute logika principo: ju pli ĝenerala signifo, des pli mallonga vorto. Do por ekzemplo la ĝis nun plej ĝenerala konata nocio, nome "kio ajn", estas en ptydepe gh, do vorto nur dulitera. Tamen ekzistas vorto ankoraŭ pli mallonga, nome f, sed tiu dumtempe havas nenian signifon. Ĉu iu el vi povus diri al mi kial? Nu?

(La manon levas sole Kalous)

Do Kalous!

KALOUS (starigas): Mi petas, ĝi estas rezervo por la kazo, ke la scienco malkovros ion ankoraŭ pli generalan ol "kio ajn".

PERINA: Ĝuste, Kalous! Vi havas la noton "eminente"!

Fino de la dua bildo.

(Tradukis J. Patera)

DONACIANTOJ POR LA MONUMENTO

85. Engen Per, Norvegio	200,-
86. Bulgara Esperantista Asocio	4 000,-
87. Ing. Margit Turková, Obořiště	605,-
88. Václav Stibůrek, Benešov	220,-
89. Magda Pelcová, Červený Kostelec	200,-
90. Joshimi Umeda, Tokyo, Japanio	600,-
91. Jarmila Pastináková, Ostrava	150,-
92. Renata Kupecká, Praha	20,-
93. Dr. Vlastimil Novobilský, Ústí n.L.	200,-
94. Joanna Filipowicz, Białystok, Poll.	200,-
95. Jaromír Kolek, Bruntál	200,-
96. Alžběta Karásková, Olomouc	200,-
97. E-rondeto "Amikeco", Česká Třebová	500,-
98. Milena Beranová, Volary	200,-
99. Marta Lorková, Brno	100,-
100. Milan Krupička, Volary	200,-
101. Ing. Emil Kaiser, Ostrava	200,-
102. Ladislav Chmelík, Přerov	200,-
103. Miroslav Malovec, Brno	800,-
104. František Šimánek, Mladá Boleslav	500,-
105. Vladimír Rotrekl, Dobšice	200,-
106. Bohumil kaj Jaroslav Mařík, Praha	3 000,-
107. Jan Sibelník, Praha	112,-
108. Jan Kašpárek, Nižkov	200,-
109. E-klubo Praha	283,-
110. PhDr. Pavla Dvořáková, Praha	1 150,-
111. Pavol Božík, Trnava	100,-
112. Josef Absolon, Hvozď	200,-
113. Olga Ungerová, Neratovice	500,-
114. Jaroslav Karhan, Olomouc	200,-
115. Mik. Čekal, Děčín	30,-
116. Miloslav Pastrňák, Havířov	300,-
117. Ing. Čestmír Vidman, Praha	30,-

(Daŭrigota)

ALVOKO



La 1-an de junio 1914 oni inaŭguris en Františkovy Lázně, okaze de la 4-a Tutaŭstria Esperanto-Kongreso, la unuan en la mondo grandan monumenton omaĝe al L. L. Zamenhof. Iniciatis ĝin la bavara fervojisto kaj loka Esperanto-klubestro Jacob Hechtl, kiu per monkollekto havigis la necesan sumon. La monumento estis kvarpilastra bloko el artefarita stono, portanta supre bronзан reliefon de L. L. Zamenhof kun surskribo: Dro Zamenhof aŭtoro de Esperanto - Per Esperanto al Paco, Harmonio, Laboro kaj Dio!

En 1938 nazioj komplete detruis la monumenton. Ĉeĥa Esperanto-Asocio opinias sia morala devo renovigi tiun ĉi historiaĵon. Por povi plenumi tion, ĈEA kunlabore kun UEA anoncas internacian monkollekton. Donacinto de almenaŭ 40 gld. aŭ 200 Kčs ricevos dankdiplomon, kiu donacos 400 gld. aŭ minimume 2000 Kčs ricevos medalon kun gravurita dankesprimio, kaj kiu donacos 5000 gld. aŭ 25000 Kčs, ties nomo estos gravurita sur la monumento. Kiu donacos la plej grandan sumon, ricevos miniaturan muldaĵon de la monumento. Kontribuon bonvolu sendi al ĈEA, banka konto 3330-021, var. simbolo 789.15.

La inaŭguro de la malnov-nova monumento oni planas por la jaro 1992, por kiu ĈEA jam proponis Pragon kiel kongresurbon por la 77-a UK. Dum tiu jaro oni festos la 400-an naskigdatrevenon de la ĉeĥa elstarulo - ofte nomata "Instruisto de la Nacioj" Jan Amos Komenský-Komenio, kiun la esperantistoj prava konsideras prapatro de la internacia lingvo.

Laŭ proponkiso de la akademia skulptisto Jiří Hrubá la dimensioj de la nova monumento estos iom reduktitaj kompare kun la origina kaj ĝi estos muldita el bronzo kaj fiksita en poluritan artefaritan stonon, alta ĉ. 2,20 m.

P. Chrdle

J. KAREN 70 jara

Poeto libroforme debutanta nur malfrue en la 70-aj jaroj, lirikisto de filozofia pripensado super la vivo kaj arto; ankau agema esperantisto, propagandisto de tradukado de la beletro en Esperanton; li mem verkas ankau en Esperanto kaj en tiun ĉi lingvon li tradukas.

Ladislav Podmele, kiu estas lia propra nomo, naskiĝis la 11-an de junio 1920 en Litomyšl. Lia patro, ŝulaboristo, mortis du monatojn post la naskiĝo de la filo pro sekvoj de malsano el la tempo de milito. La filo spertis la pezan vivon de terkultur-laboristoj en Montetaro /en Podhorany ĉe Skuteč/. Li ellernis la librovendistan fakon en Vysoké Mýto /1935-37/, laboris kiel komizo ĉe librovendistoj en Vysoké Mýto kaj Kladno. Nur kiel dudekjara li komencis studi superajn klasojn de gimnazio /en Hradec Králové, 1940-42/. La vivspertoj ekde la peza laborego de la patrino - terkultura laboristino trans la lernojaroj, la deviga laboro en Germanio kaj la milito aperas en lia poezio; en liaj poemkolektoj konstante aperas bildoj de "lando /kie unuj tronis en kaleŝo/ kaj aliaj kuris nudpiede". Kiel esperantisto li kontribuas en gazetojn Peco /eldonata en Prago/, Fonto /Brazilo/, Heroldo de Esperanto /Hispanio/, Pola esperantisto /Pollando/, Bulgara esperantisto /Bulgario/. Li tradukas artikolojn kaj prozajn verkojn, antaŭ ĉio de Kožík, kaj mem publikigas proprajn Esperantajn poemojn, antaŭ ĉio en almanakoj Niaj aŭtoroj sin prezentas /Prago 1980/ kaj En la koro de Eŭropo /Prago 1983/.

Versojn li komencis publikigi jam en la jaro 1937 /unue sub pseŭdonomo Jiří Janda/ en Jitro /Mateno/, Studentský časopis /Studenta gazeto/, Svoboda /Libereco/ en Kladno k.a. En la jaro 1940 estis jam preparita por eldono kolekto Zpíváno k zemi /Kantate al la lando/, unu jaron poste estis aperonta Cesta k slunci /La vojo al la suno/, sed restis nur la planoj. En novembro 1942 li estis devigita interrompi la studojn kaj estis sendita devige labori en Germanio - en Magdeburg, Halle/Saale kaj Nordhausen.

El Germanio li sendadis kontribuaĵojn en stencilitan gazeton Zrcadlo /Spegulo/, redaktatan de studentoj en Hradec Králové. La maturec-ekzamenon li plenumis kaj altlernejon li komencis studi nur post la majo 1945 /fakon filozofio-historio en la Praga filozofia fakultato, finstudis en 1949/ kaj sian libro-debuton li atingis nur post sia kvindekjarigo. Li laboris kiel mezlerneja profesoro en Ústí nad Labem /1949-51/ kaj en Kladno /1951-54/, poste kiel estro de katedro de historio kaj civitana scienco en Instituto por plua edukado de instruistoj en Prago /1954-61/ kaj laboranto de Esplorinstituto de fakaj lernejoj en Prago /1962-76/.

La poezion de Karen karakterizas koncizema, kompakta esprimo, lia libera verso proksimiĝas al prozo. Li evitas inversojn en la vortordo, rezignas pri melodieco de la verso. Ol metaforon li preferas komparon. Kortuson li superas per afereco, sed li ne timas grandajn verojn. Liaj kolektoj estas konforme komponitaj prefere kiel poemelektoj el tutviva verkaro. Ili okupas vastan skalon laŭ-

teman /travivaĵoj militaj, patriotaj, antifasismaj versoj, antemaro, natura liriko, filozofia ekmedito super la vivo/ kaj laŭforman, de la poetiko klare markita per influo de Halas, Závada kaj Holan ĝis la *aparta*, matura kreado, ofte kun aludo de scianta kaj komprenema humuro, trovanta placon en akre metataj kontrastoj.



Tiel ĉi Štěpán Vlašín priskribas la vivon kaj verkadon de nia freŝa sepdekjarulo Jiří Karen. En la ampleksa enciklopedia verko "Ĉeĥaj verkistoj de la 20-a jc." oni povas legi pli detale pri unuopaj poemkolektoj de Karen, nome pri *Vteřiny zrání* (Sekundoj de maturigo, 1972), *Okrídlený kámen* (Flugilhava stono, 1973), *Den laskavý na slova* (Tago afabla je vortoj, 1976), *Pláště do deště* (Pluvmantelo, 1976), *Hledání modrého tónu* (Serĉado de blua tono, 1979).

Piue oni povas ekscii, ke sub sia propra nomo L. Podmele li elĝonis vicon da fakaj verkoj filozofiaj kaj pedagogiaj, kiel ekz. *Superstiča kaj naiiva pensado kiel teoria problemo* (1969), *La modernigo de instruprocedo en la civitana edukado en fakaj kaj profesiaj lernejoj* (1969) kaj ankaŭ metodikajn manlibrojn.

Honorigoj al esperantistoj

Membro de Centra Komitato de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj prezidanto de la scienc-teknika sekcio de ĈEA. doc. RNDr. Vlastimil Novobilský, CSC., estis elektita en decembro 1989, per sekreta kaj senpera elekto,

dekano de la Pedagogia Fakultato de la Karlo-Universitato

en Ústí nad Labem. Al nia kara samideano ni ĉiuj sincere gratulas kaj esperas, ke lia rangigo kontribuos al plua progreso de la Esperanto-instruado en la Pedagogia Fakultato.

Nur antaŭ nelonge ni eksciis, ke nia juna pasintjara sesdekjarulo s-ano Ludvík Chytil el Přerov okaze de sia vivojubileo ricevis de la distrikta komitato de Nacia Fronto en Přerov Lenin-plaketon por lia multjara kaj oferema laboro en la Nacia Fronto kaj de la Ĉeĥoslovaka Pac-Komitato memor-medalon por lia ekzemplodona pac-aktiveco en la jaro de la 40-a datreveno de la monda kaj ĉeĥoslovaka pacmovado. Ni gratulas.



VUK ECHTNER OKDEKKVINJARA

La honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio s-ano Vuk Echtner la 10-an de julio farigos 85-jara. Dum multaj jaroj li tre ofere kaj sindoneme laboris por la nevidantaj esperantistoj redaktante iliajn revuojn kaj respondante multajn leterojn de la legantoj. Al s-ano Echtner ni deziras multajn jarojn de sano, felice kaj kontenteco. (Sur la foto V. Echtner skribanta brajlan tekston.)

LA AGADO DE LA JUNULARO

GEJUNULOJ AKTIVIS DUM SET

Kiel ĉiujare ankaŭ en 1989 okazis Somera Esperanto = Tendaro en Lančov. Oni povas paroli pri tria etapo kiel pri "preskaŭ junulara" etapo. Ne nur pro granda nombro de junaj gelernantoj, sed ankaŭ /kaj tio estas laŭdinda/ pro multaj junaj geinstruistoj. Krom eksterlandaj instruistoj estas ĉiuj ankaŭ aktivaj membroj de Junulara Sekcio de ĈEA - Januome I. Czafíková, L. Czafík, M. Křížek, PhDr. P. Dvořáková, ing. V. Dvořák, J. Smejkal, V. Chvátalová.

La trian etapon partoprenis proksimume 130 homoj el 5 landoj - Bulgario, GDR, Sovet-Unio, Hungario kaj Ĉeĥoslovakio. Malgraŭ ne tro bona vetero ĉiuj tendaranoj povis esti kontentaj, ĉar organizantoj preparis sufiĉe rican programon, ekz. viziton de alloga teatraĵo en kastelo Vranov, ekskursojn en la ĉirkaŭaĵon, vesperojn ĉe tendarfajro, amuzajn konkursojn, tutagan ekskurson kun trarigardo de kelkaj vidindaĵoj en suda Moravio kaj multajn aliajn interesajn programojn. En la tendaro regis amika medio, la partoprenantoj ligis novajn, firmajn kontaktojn.

Janulara Sekcio volas nun-jare fari trian etapon de SET vere junulara, do kiu volas partopreni kaj helpi en la laboro, nepre aliĝu. Ĝis revido en Lančov!

Monika Čerevková

RAPORTO PRI SEJAK

Inter la 6-a kaj 8-a de oktobro 1989 Junulara Sekcio de ĈEA organizis en Blatná ĉe Strakonice la II-an SEJAK /Seminarion por junaj aktivuloj/, kiun partoprenis entute 16 sekcianoj. Kompare kun la pasintjara seminario, kiu estis orientita al enkonduko en ĝeneralan problemaron de funkciuala agado en E-ista movado, ĉi-foje oni elektis por pritrakti nur unu specialan temon, nome "Metodikon de organizado de enlandaĵ aranĝoj".

Prelegantoj - estraranoj de JS /vicprezidentino dr. Pavla Dvořáková, sekretario-kasisto Karel Ryšánek kaj respondeculino pri aranĝoj ing. Jana Burianová/ konatigis la ĉeestantojn kun ĉefaj praktikaj principoj de la organiza laboro - oni diskutis ekz. pri metodiko de planado kaj pri kunordiga laboro de JS, pri traktado kun eksteraj partneroj koncerne mendadon de loĝigo, mangado ktp., prilaboro de "politikaorganiza certigo" de la arango, kreado de propagandmaterialoj kaj invitiloj, verkado de raportoj, organizado de la administraj laboroj kaj tiel plu. Speciala atento estis dediĉita al financaj problemoj - metodiko de kreado de buĝeto, fiksado de partoprenkotiĝo, manieroj de pagado, kontado, traktado de eventualaj profitoj aŭ

malprofito. Vespero estis dediĉita al temo "kreado de la programo por la arango" - oni ne nur diskutis, sed ankaŭ praktike ellernis plurajn ludojn, kiuj ebligas amuzi kaj interligi la homojn kaj samtempe ankaŭ iom ekkoni iliajn ecojn. Kelke da libera tempo inter la preletoj estis uzita por mallonga promeno tra najbara ĉasarbaro kaj por vizito de interesa ekspozicio de aŭstrala fotoarto en la urba muzeo.

Dum dimanĉa antaŭtagmezo la ĉeestantoj estis informitaj ankaŭ pri organizado de la turismaj servoj en Esperantujo /strukturo kaj agado, Monda Turismo, Esperantotur, konstantaj klerigaj centroj, utiligo de Pasporta Servo, Amikeca Reto ks./. Krome - kaj tion ĉefe celis la seminario - estis disdonitaj konkretaj taskoj koncerne organizon de aranĝoj kaj tiel oni fine sukcesis komune krei kunordigan planon de aranĝoj de JS por la jaro 1990, kiu jam enhavis konkretajn datojn kaj nomojn de respondeculoj, plejparte ankaŭ okazlokon. Entute ĝi inkluzivas 19 tri- kaj plitagaĵajn diversspecajn renkontigojn.

Ĝenerale oni povas pritaksi la seminarion sufiĉe pozitive - ne nur laŭ programa vidpunkto kaj laŭ "labora disciplino", kiu estis vere gojiga, sed ankaŭ rilate al logigaj kaj mangigaj servoj, kiujn oferece prizorgis longdaŭra membro de la sekcio Jan Rybář el Blatná.

Venota SEJAK okazos en la sama dato en ĝis nun nefiksita loko kaj plej probable ĝi estos dediĉita al problemaro de informa kaj propaganda laboro.

PhDr. Pavla Dvořáková
ĉeforganizanto

IMUR 1989

En la tagoj 26.-29.10.1989 okazis en Ostrava 1-a Internacia Muzika Renkontigo. Tiun ĉi renkontigon partoprenis ĉefe gejunuloj el 7 landoj: Francio /4/, FRG /2/, Hungario /2/, Nederlando/4/, Pollando /2/ kaj ĉ. 30 ĉeĥoj.

Dum IMUR el eksterlandaj partoprenantoj prezentis sin nederlanda ensemblo KAJTO, franca muzikisto JOMO kaj ANDREA QUITZ el GDR, kiuj ne nur kantis, sed ili akompanis sin per diversaj muzikinstrumentoj - kreinte bonegan atmosferon. El enlandaj muzikistoj prezentis sin popolensemblo ODRA, folkgrupo PARADOKS, pedagogosenmblo REDYO, B. Šrutová /klarneto/ kaj folk-kanzonisto Z. Černohouz.

Enkadre de la renkontigo okazis - inter aliaj programoj - preleĝo de MARTORELL el Francio pri EŬROKKA /Asocio de EŬropaj ROKmuzikistoj/, preleĝo de T. KERESZTHEGYI kaj M. JUHASZ el Hungario, kiuj prezentis Turistajn Kantarojn kantante kelkajn kantojn el iliaj ĉapitroj, kaj projekciado de ĉeĥa muzikfilmo Balada pro banditu /Balado por bandito/ kaj aliaj videoprogramoj. Dum IMUR la partoprenantoj trarigardis la centron de urbo, vizitis Domon de Arto kaj partoprenis ekskurson en Muzeon de popola arkitekturo en ROŽNOV POD RADHOSTĚM.

La partoprenantoj de IMUR estis logigitaj en privataj loĝejoj. Problemoj estis nur kun mangado en restoracio Bohemia, kie la partoprenantoj longe devis atendi tagmangojn kaj vespermangojn, sed alie dum la tuta renkontigo inter ĉiuj partoprenantoj regis bonega etoso.

IMPRESOJ EL HAVÍROV

Dum la periodo, kiam Varsovio preparis sin al organizado de la unu-aseptembra Kontraŭmilita Manifestacio kaj ankaŭ al la "Tagoj de Prego por la Paco", mi troviĝis en Havírov, la urbo en norda Moravio, kie estis aranĝataj la "Festotagoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio" okaze de ties jarduĉko. La tagoj, okazintaj de la 25-a ĝis la 28-a de aŭgusto 1989, sukcesis plene rilate al organiza, same al propaganda flankoj. La riĉa kaj plurfaka programo estis realigita kun partopreno de multnombra frekvenco de diversnacia esperantistaro kaj kun ceesto de instancoj de la loka administracio.

Nia koruso "Muzilo" ricevis la honoron malfermi la ĉefan oficialan kunvenon (sabate la 26-an de aŭgusto) per plenumo de "Kanto de la Ligo" - kun teksto de d-ro Ludoviko Zamenhof, verkita al la melodio de Wolfgang Amadeus Mozart. - Dum la posttagmeza arta parto de la solenaĵo elpasis la kvarvoca virina sekcio de "Muzilo" - ampleksante en sia koncerto kantojn el diversnacia repertuaro de famaj komponistoj, i.a. de la ĉeĥaj (unu kanton de Dvořák en la originala lingvo); sekvis popol-kanzonoj de elektitaj landoj kaj eksterprograme la koruso plenumis melodion de Giordani kun jena teksto: Vivu longe kaj bonsane kun la bona akompane, ĉiuj zorgoj fugu for - hejme regu Esperanto, la muziko kaj la kanto kaj la paco en la kor'. La koncerto estis akceptita tre vigle kaj varme de la esperantista kaj neesperantista publiko.

Mi deziras mencii, ke kadre de la Tagoj mi havis favoran okazon ekligi personan kontakton kun ĉeĥaj aktivuloj de Esperanto, nome: kun s-ano Petr Chrdle - la prezidanto de ĈEA, kun s-ano Vlastimil Kočvara - ĝia respondeculo por kultura agado kaj kun s-ano Drahomír Kočvara - gvidanta fakon pri la pac-movado; mi diskutis ankaŭ kun la sekretario de Slovacia Esperanto-Asocio s-ano Milan Zvara. Ni diskutis intencon aranĝi turneon "Esperanto - la lingvo de paco" tra la agad-teritorio de ĈEA.

Mi aldonu ankaŭ, kun plezuro, ke mi faris amikan konatiĝon kun la prezidanto de la loka E-Klubo, s-ano Miloslav Pastrnák; li cetere opiniis la urbon Havírov unu etapo de la organizota turneo; la turneo, realigonta la premison agi pere de art-kulturaj aranĝoj por plibonigi la interhomajn rilatojn, antaŭ ĉio la najbarajn. Tiukaze ni denove renkontiĝis en la bela urbo Havírov, kies gastemajn mastrojn ni nun rememorigas kun simpatio kaj dankemo.


FOTOKRONIKO de STARTO




Haviřov 1989



- Ing. P. Chrdle transdonis ateston pri honora membreco de ĈEA al D. Kočvara.
- Roman Dobrzyński gratulas al A. Stanura, kiu farigis honora membro de ĈEA.
- Ing. Chrdle parolas kun J. Umeda, R. Dobrzyński kaj J. Giessner.
- Akcepte ĉe la urbestro de Haviřov.

- 
- Lokaj danckolektivoj kontribuis al la programo.
 - La "Brava soldato Ŝvejk" de pola teatro placiis al ĉiuj.
 - Modan revuon komentis D. Kočvara.
 - Esperanto-ekspozicio estis sukcesa.



Suferas la rizgreno sub la bato rizpistila
Sed pasis la elprovo, miros vi pro l' blanko brila!
Similaj estas homestaĵoj en ĉi-monda vivo:
Por igi hom', necesas la pistil' de l' malfeliso.

Tiel skribis en unu el siaj poemoj la granda vjetnama ŝtatestro, gvidanto de la naciliberiga batalo de la vjetnama popolo, prezidento de Vjetnama demokratia respubliko Ho Chi Minh.

Li naskiĝis antaŭ 100 jaroj, la 19-an de majo 1890 en vilago Kim Lien. Estante 24-jara li venis en Francion, kie li konatigis kun priso-cialismaj ideoj. En la jaro 1920 li ceestis en Tours la fondkongreson de Komunista partio de Francio kaj farigis ĝia membro. Sed baldaŭ oni forigis lin el Francio kaj revenvoje li estis arestita en Hongkongo kaj du jarojn li restis en prizono. Post la liberlaso li estis devigita vivi en Ĉinio en profunda senleĝeco, sed li havis kontaktojn kun la vjetnamaj revoluciuloj en la patrio.

En la jaro 1941 finigis lia pli ol tridekjara elmigriĝo. Kun siaj kumbatalantoj li eklogis en montara vilago Pac Bo apud la ĉina landlimo; tie ne majo 1941 okazis senleĝa VIII-a kunsido de CK de la Partio, kiu fondis la Fronton por sendependeco de Vjetnamio kaj elektis Ho Chi Minh kiel estron de la Fronto.

En la jaro 1942, estante en Ĉinio, li estis denove arestita, nun fare de ĉiangkajsekanoj, sed post 18 monatoj oni sukcesis liberigi lin. Li revenis en la groton Pac Bo kaj de tie li direktis la batalon kontraŭ la japanaj okupantoj.

La 2-an de septembro 1945 li proklamis en Hanojo kiel prezidento la sendependecon de Vjetnamio. Sed la batalo ne finigis. Francio ne volis perdi gravan kolonion kaj jam en 1946 komenciĝis nova armita batalo por la libereco de Vjetnamio. Post la venko de patriotoj apud Dien Bien Phu francoj devis forlasi Vjetnamion, sed en 1965 venis alia malamiko - Usono. La batalo finigis per glora venko de la vjetnama popolo en la jaro 1975. Sed Ho Chi Minh ne gisvivis tion - li mortis la 2-an de septembro 1969 en Hanojo.

Fina venko!? - Oficialigo!?

Aŭ "ĉu revii" - aŭ "ĉu pensi kaj agi realisme"?

Ĉu ĉi tiuj alternativoj formas la demandon de la plua vojo de nia movado?

Antaŭ analizi ambaŭ eblecojn mi volas klarigi mian personan starpunkton.

Post mia longjara pripensado pri nia movado, kiel izolita esperantisto, mi povas respondi al ĉiu nekredanto pri la oficialigo de nia lingvo jene: "Se vi ne kredas, do ni estas jam du. Tamen estas inter ni malgranda diferenco. Mi volas fari ĉion prudentan, bonan kaj honestan por atingi tiun noblan celon."

Kial mi ne kredas? Ĉar mi konas multegajn aliajn ankaŭ bonajn, utilajn kaj noblajn projektojn, kiuj pro la homa malsageco ankoraŭ ne realigis. Ja, bedaŭrinde, ankaŭ tio estas inter la homoj tute normala.

Ĉu nur tial, aŭ por ne esti ridindaj, ni ĉiuj esperantistoj, entute pur- kaj yerdkoraj homoj, aliel dirite frenezuloj kaj fantaziemuloj, devus ĉesi revii?

Mi demandus scivole: "Kiel eble aŭ verŝajne pensis Zamenhof?" Kiel frenezulo kaj fantaziemulo, aŭ kiel cetera malalta, sed realisma kreintaĵo?

Sen alta celo, oni ne povas vidi kaj imagi necesan ŝtuparon por atingi entute ion.

Manko kaj eraro kuŝas ie alie, sed certe ne en la finvenka celo de nia movado. Sed tute ne sufiĉas modeste forjeti siajn noblajn revojn, konscie perdi sian fieran nomon de Esperanto, paroli nur pri ia "Lingvo Internacia" kaj atendi malgrandajn tute hazardajn sukcesojn kaj gojojn. Planlingva movado senkondice bezonas severan laŭplanan procedon kaj proceson, kie unu paŝo kontinuigus la antaŭan kaj preparus la venontan. Tio validas generale kaj por la malriĉa movado precipe.

Mi ne konsentas kun s-no Miroslav Malovec en la slogano "Utileco, ne venko". Mi scias, ke tio estis bone pensita, sed ĉi tie estis farita grava eraro, ĉar oni miksis du nociojn:

- la fina venko estas la celo,
- la utileco estas nur la necesa kaj neevitebla etapo de la evoluo por atingi la finan celon.

Mi tute konsentas, ke estos pli prudente senlace labori, propagandi kaj plani paŝojn de la nuntempa etapo de la evoluo ol prezentadi al neesperantistoj por ili neimageblajn utopiojn.

Sed miaj "Verdaj pripensoj", kiujn mi skribe preparis kaj el kiuj mi eltiris iom da pensoj, estas destinitaj nur por esperantistoj, ĉar aliaj apenaŭ povus kompreni ilin.

Ing. JUDr. Miroslav Tůma, CSc.

PRIMISLIDOJ KAJ KAROLA PONTO

Ĉe legado de prospekto "Kun ĈEDOK al Prago kaj al Meza Bohemio" ekinteresis min precipe la du nomoj, kiujn vi legas en la titolo.

Ĉiu ĉeĥo scias, ke la fondinto de la ĉeĥa dinastio nomitis Přemysl. Liaj postguloj estis do Přemyslidoj. Al iu ne placas eble la kunigo de la ĉeĥa nomo kun Esp-a sufikso; tiu povas skribi Přemysl-idoj. Estas por mi vere mistero, kial la aŭtoro de la teksto en la prospekto ŝanĝis la ĉeĥan nomon je Primisl. Oni legas eĉ "Primislidino". Ĉu tio estas eble imitado de iu fremdlingva formo? El la tempo, kiam germanaj faŝistoj "protektis" niajn landojn, mi memoras, ke ili uzis en siaj tekstoj la formon "Premysliden" /aŭ "Przemysliden"/. Ĉe la nomo Primislidoj ne estas en la prospekto notita la ĉeĥa formo, sed ekz. ĉe Vultavo oni trovas en krampoj la konvenan klarigon: Vltava. Mi pensas, ke ne estas guste, arbitre ŝanĝi ĉeĥan nomon.

Koncerne la nomon Karolo mi jam antaŭ longe interŝanĝis opinion kun aŭtoroj de la Historio de E-movado en Ĉeĥoslovakio. Al mi ne ŝajnas konvena la trisilabeco de tiu nomo, ja jam en la j. 1909 eldonis Edmond Privat sian romaneton "Karlo", kiu estis multfoje reeldonita dum plujaj jardekoj kiel ŝatata legaĵo por kursoj de progresintoj. Kaj en la naĝigj lingvoj oni trovas formojn dusilabajn aŭ eĉ unusilabajn /almenaŭ ĉe prononcado/: Karl - germ., ruse, Carl - svede, Charles - france, angle, Carlos - hisp. ks. Kial do devas havi Esp-o la formon trisilaban? PIV /2-a eldono 1977/ indikas ĉe la nomo Karlo: alia formo de Karolo. Laŭ tio la uzantoj de PIV konkludas, ke la formo Karolo estas preferata. Sed la opinioj ŝanĝigas. Mi ne dubas, ke la tekstojn ĉe Karolo kaj Karlo en PIV stiligis G. Waringhien. Post kelkaj jaroj mi prenis en la manojn la Plenan Analizan Gramatikon, eldonitan en 1980. Jam sur la p. 29 mi trovis dufoje la formon Karlo. Kaj tiu retroveblas sur p. 30, 58, 186, 188, 189, 190, 22, 364, sur iuj pagoj 2- eĉ 4-foje, entute 19 foje. Eĉ ne unufoje Karolo! Nur sur p. 68 estas Karolidoj, sed sur p. 453 Karlidoj. Tial mi forte insistas, ke oni ne parolu pri Karolo la Kvara, sed pri Karlo.

Kaj nun pri kunigo de la nomo Karlo kun la konataj pragaj universitato kaj ponto: Pri la universitato estas neniu mencio en la prospekto, sed jam dum kelkaj generacioj, en niaj Esp-aj publikigaĵoj oni skribas Karola Universitato. Tio estas evidente sklava imitado de la latină Universitas Carolina. En la nuna tempo estas pli konvene diri Karlo-universitato kaj Karlo-ponto, ja en la prospekto oni trovas Gottwald-ponto, Klaus-sinagogo /sed sub tio "sinagogo de Maisel" kaj "sinagogo de Pinkas"/, plu ankaŭ Smetana-halo ks. Memkomprene, alia afero estas ekz. Katedralo de S-ta Vito aŭ Klostro de S-ta Georgo ktp., kie la imito de la "Karlo-universitato" estus iom peza. Cetere, oni povas diri ankaŭ Universitato de Karlo kaj ponto de Karlo.

Adolf Staňura

Bernard Golden

Nebuleca prezentado de la problemo

En Inter-Monato /decembro 1987/ aperis sur pĝ. 3 - 4 longa kaj teda komento pri la uzo de la vorto "ŝlagro" en la magazino Monato. La Koncerna citaĵo estas:

"La rondvojaĝoj vere ŝlagris" /Monato, 12/87, pĝ. 16/.

La neologismo "ŝlagri" estis glosita per jena difino:

"furore sukcesi; derivita de "ŝlagro": furore sukcesa kanzono, teatraĵo, libro laŭ la germana Schlager."

Ŝajnas, ke tiu klarigo ne estis kontentiga, ĉar la verkinto de la komento en Inter-Monato, kaŝante sin malantaŭ la pseŭdonimo "Provleganto", ne kapablis racie solvi la problemon de la gusta uzo de "ŝlagri" en la frazo kaj pri la ekzistaroj de "ŝlagri" en Esperanto. "Provleganto" prave informas, ke "ŝlagro" ne estas registrita en Plena Vortaro nek en Plena Ilustrita Vortaro. Mi povas aldoni, ke ĝi mankas ankaŭ en la Suplemento de PIV/1987, en Neologisma Glosaro - Eta Postrikolto al PIV/1983 de Henri Vatré, kaj en Ciu-tagaĵ vortoj kun difinoj/1987 de Rikardo Ŝtalo.

Registrado de "ŝlagro" en Esperantaĵ vortaroj

En nederlanda kaj Esperanta vortaro, eldonita en 1971, "ŝlagro" estas registrita kiel la ekvivalento de la nederlanda vorto schlager. "Ŝlagro" aperas ankaŭ en angla kaj Esperanta vortaro, publikigita en 1969. Ĝi estas sinonimo de "Modkanto" kaj respondas al la angla esprimo hit song.

La etimologio de "ŝlagro"

Etimologie "ŝlagro" estas facile spurebla al la germana substantivo Schlager /elp. SLAGer/, kiu siavice devenas de la verbo schlagen /bati, frapi, venki/. Germanaj Esperanto-vortaroj donas kiel tradukojn de Schlager jenajn vortojn: modkanto, furorkanto; /en generala senco/ modajo, furorajo. Evidentas, do, ke "ŝlagro" povas esti uzata en aliaj kuntekstoĵ, ne rilatantaj nur al muziko aŭ kanzonoĵ.

La sinonimo "hito"

En Heroldo de Esperanto /1982/8, pĝ. 3/ aperis elĉefigita tradukaĵo titolita "La hitkantisto". La sekva citaĵo ilustras la uzon de la substantivo "hito": "Ĉar kanzono, kiun la homoj ne povas poste kanti ankaŭ mem, mem por si kaj inter si - tio estas nenia hito." La tradukinto, J. Kofinek ne degnis glosi la novan radikon "hit-". Alia ĉeĥa novelo, esperantigita de Adolf Staĥura, kaj publikigita en Sferoj 4, enhavas jenan frazon: "En ĉiuj altoĵ ... lumis, torentis kaj eksplodis intime konataĵ sloganoĵ ... kaj apud tiuj ĉi surskriboĵ, ĉirkaŭ ili ĉe inter unuopaj literoj petolis longjara hito ..." La neadekvata glosa de Staĥura estas "aktuala cieaĵo". "Hito" venas de la angla vorto hit kaj en la kuntekstoĵ estas sinonimo de "ŝlagro". La angla verbo to hit, same kiel la germana schlagen, signifas bati, frapi. La esprimo hit parade estas uzata por grupo aŭ listigo de la plej popularaj aĵoj, ekzemple furoraj kantoĵ. Estas evidente, ke "hit" jam farigis mortnaskita neologismo en Esperanto pro la konkuro de "ŝlagro".

La enkonduko de "ŝlagro" en Esperanton

Por daŭrigi la spuradon de "ŝlagro", estas necese retroiri kelkajn jardekojn, ĉar "ŝlagri" ja estas malnova neologismo. En 1967 Hungara Esperanto-Junularo eldonis broŝureton titolitan Hungaraj ŝlagroj kaj popolkantoj. "Ŝlagro" ne estas glosita en tiu verko, kaj tiutempaj hungaraj Esperanto-vortaroj ne registris ĝin. Antaŭ ankoraŭ unu jardeko aperis la romano Tiel Okazis au Mietero Minora /1958/ de la hungara esperantisto Ferenc Szilágyi. Sur pg. 21 melodio estas priskribita jene: "Ĉi havas iom el la ŝlagroj, sed jam pasintaj." En sampaĝa piednoto "ŝlagro" estas glosita kiel "kanzono populara". Ĉar ĝis nun mi ne sukcesis trovi pli fruan uzon de "ŝlagro" en Esperanto, mi provizore donas al Ferenc Szilágyi la honoron esti la enkondukinto de tiu vorto en Esperanton.

La etimo de la Esperanta vorto

Nun venas etimologia problemo rilate Esperanton. De kie Szilágyi prenis la vorton "ŝlagri"? Lia gepatra lingvo ne estis la germana sed la hungara, do estas multe pli probable, ke la etimo estas la hungara vorto "sláger" /elp. SLAGer/. Komprenible, ĝi venis de la germana lingvo, sed en la hungara ĝia semantika tereno pli vastiĝis: 1. grandefekta, laumoda, leĝera muzikajo; 2. debiĉa, dezirata, serĉata, kutime malmultekosta artiklo; 3. en prezentado aŭ programo, la plej granda sukceso, la sensacio; 4. en kartludado, atuto.

Esprimo de la koncepto en aliaj lingvoj

Ne nur la hungara lingvo prunteprenis la germanan vorton Schlager; ĝi troviĝas ankaŭ en aliaj lingvoj de Mezeŭropo. Jen la formoj kun la Esperantaj ekvivalentoj registritaj en etnolingvaj vortaroj: ŝlager /slovaka/ - furora kanto, furora muzikajo; ŝlager /serbkroata/ - modkanto, furorkanzono, furoro; ŝlager /slovena/ - modkanto, furorkanto - kaj ankaŭ - devizo, moto, maksimumo, slogano /kp. "frapfrazo"/; ŝlager /bulgara/ - 1. modkanzono, moda danckanto, 2. modernajo, furoro, impresajo, rimarkindaĵo /por la sezono/, lastmodaĵo, 3. bakaraĵo /kartludo/. La bulgara adjektivo ŝlageren signifas "moda, rimarkinda, populara", kaj la esprimo ŝlagerna muzika estas "moda dancmuziko".

En aliaj germanaj lingvoj havantaj parencajn morfemon - slag - tiu ĉi estas uzata por vortformado: slagdanga /sveda/ estas stratbalado, kanzonaco; slagnummer /sveda/ estas tradukita per "furoraĵo"; slager /norvega/ estas popularmelodio, furormelodio.

Ĉu "ŝlagro" restos en Esperanto aŭ ĉu post iom da tempo anstataŭos ĝin la ekzistantaj radikoj "mod-" kaj "furor-"? Sajnas, ke "ŝlagro" nun estas survoje al enradikiĝo, do PIVR /Plena Ilustrita Vortaro Reviziita/devos registri ĝin. Estas ankoraŭ tro frue scii, ĉu ĝi estos ĝenerale aplikata al ĉiuspecaj modaĵoj kaj furoraĵoj krom kantoj kaj muzikajoj, sed ne estas iu ajn racia kialo malpermesi tiun semantikan evoluon, spegulantan la uzadon en pluraj etnolingvoj.

Reviziita: marto 1989

Bernard GOLDEN
Damjanich u. 1/C, I. 8.
H-8200 Veszprém
Hungario

Ni legis

Por diskuti pri E-instruo en alternejoj, la Guangdong-a Alteduka Burao okazigis kunsidon, en kiu oni proponis konkretajn rimedojn por akceli la E-instruadon. La kunsido postulis, ke ĉiuj lernejoj, kie oni instruas Esperanton, altigu la instruan kvaliton konforme al la instruprogramo. Ĝi postulis ankaŭ, ke tiuj, kiuj volas funkciigi E-kurson, tamen ne havas necesajn kondiĉojn, devas kulturi instruistojn. La kunsidon ceestis reprezentantoj de la Ji'nan-a Universitato, Zhongshan-Universitato, Suddinia Instruista Universitato, Guangdong-Normala Instituto kaj la Unua Medicina Universitato de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

La 4-an de junio 1989 fondigis la E-Asocio de la Sud-guizhou-a Boujej-mjau-nacia Autonomia Subprovinco en Guizhou-provinco. Kun 108 membroj el kiuj 44 estas boujejoj, mjau-joj, suj-joj, ji-joj, dong-joj kaj tu-joj, ĝi estas la tria E-asocio de nacimulta autonoma subprovinco en Ĉinio. La aliaj du estas E-asocio de Changji-huj-nacia Autonomia Subprovinco, Xinjiang kaj tiu de Yanbian-a Korea Autonomia Subprovinco, Jilin.

Maje de 1989 la Eldonejo de Akademias Revuoj, Ĉinio, publikigis "Biblioteka Terminaro" kompilitan de Doug Portmann (Usono) kaj Koralo (Ĉinio). La terminaro kun pli ol 1 300 terminoj bibliotekologiaj, inform-sciencaj, eldonaj, presartaj, dokumentaj k.a. Kun 5-lingva indekso en la fino, la libro estas arangita en ordo de Esperanta alfabeto kun samsencaj terminoj anglaj, ĉinaj, francaj, germanaj kaj hispanaj. La libro, montrante novan disvolvigon de la biblioteka fako, estas la unua plurlingva biblioteka terminaro presita laŭ Esperanta alfabeto.

(El Popola Ĉinio 10/89)

Por akceli Esperantan turismon, plifortigi interkomprenon kaj amikecon inter ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj, la redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj la Ĉina Amikeca kaj Turista Hotel-grupo decidis kune organizi vizitgrupojn de EPC-amikoj al Ĉinio per favora kosto ekde

1990. Legantoj de RĉC kaj membroj de UEA, kiuj veturos al Ĉinio por turismo, ofico, vizito al parencoj kaj amikoj, ĝuos rabaton en hoteloj sub la Ĉina Amikeca kaj Turista Hotel-grupo kun karto de EPC-leganto kaj membrakarto de UEA. La hotel-grupo kun 17 hoteloj kaj turismaj servoj sub si certe kontentigos la bezonon de diverslandaj turistoj. Ĝiaj hoteloj kun 13 000 litoj troviĝas en diversaj multe vizitataj urboj.

(El Popola Ĉinio 11/89)

La unua studreferaĵo pri Esperanto en Centrafrika Respubliko, kaj kredeble en tuta Afriko, estis verkita kaj defendita de studento Idriso Musa (Bangia Universitato) pasintan julion. La 36-paĝa eseo komparas la relativan lernfacilecon de Esperanto kaj la angla.

Okaze de la 175-a datreveno de la naskigo de Taras H. Ŝevcenko, renoma ukraina poeto kaj pentristo, la eldonejo "Naukova dumka" aperigis libron de 150 tradukoj de unu lia poemo, "Testamento". Krom Esperanta traduko fare de Nadija Andrianova-Hordijenko, kvar naciolingvaj tradukoj - en la irlandana, gaela, kimra kaj malta - estas faritaj per uzo de Esperanto kiel pontlingvo. (Esperanto 11/89)

La franca grupo "Ekologia kaj Esperanto" prizorgis budon en granda ekologia foiro en Parizo de la 4-a ĝis la 12-a de novembro 1989. Laŭ ĝia gvidanto Emilo Mas bonaj kontaktoj dum la foiro helpis atingi, ke la franca verdula partio en sia jarkongreso la 18-an kaj 19-an de novembro alprenis rezolucion favore al la uzo de Esperanto en siaj internaciaj kontaktoj.

La Universala Ekspozicio "EXPO '92" en la hispana urbo Seviljo uzas Esperanton kiel unu el siaj informaj lingvoj.

(Esperanto 12/89)

La 17-an de decembro oni inaŭguris impone altan monumenton je Zamenhof en la hispana urbo Sabadell. E-monumento en Maracaibo, Venezuelo, estis inaŭgurita fine de aŭgusto 1989. (Esperanto 1/1990)

NE NUR POR KOMENCANTOJ

Věra Barandovská: Esperanto pro samouky, SPN Praha 1989, 368 p., eldonkvanto 20 000 ekzempleroj, 35 Kčs.

La lernolibro por aŭtodidaktoj estas aranĝita kiel duŝtupa lernilo, por komencantoj kaj por progresintoj. La lecionoj 1-22 prezentas elementan kurson, dum en la lecionoj 23-32 trovas siajn ekzercojn progresintoj.

Ĉiun lecionon konsistigas du pli malpli memstaraj duonlecionoj, signitaj A kaj B, kun parencaj temoj, sed kun propra artikolo kaj propraj novaj vortoj. Kapabla kursano povas ambaŭ partojn ellerni samtempe kiel unu lecionon, malrapida kursano aŭ infano povas ĉiun parton studi aparte, do kiel du lecionojn. Tial la lernolibro taŭgas same bone por studentoj kiel por geknaboj kaj maljunaj personoj. La lecionoj 11 kaj 22 estas ripetaj, ili resumigas la lernitan gramatikon kaj vortprovizon, fiksas ilin en la memoro per taŭgaj ekzercoj.

La dua parto de la libro iom memorigas la faman internacian lernolibron de William auld "Paŝoj al plena posedo": literaturaĵo - vortareto - ekzercoj. En la parto A la studanto trovas spritajn bonhumorajn rakontojn, en la parto B popularsciencajn artikolojn pri diversaj temoj: Pri la kafo, Nia aero, Sana junularo, Skiado, Zoologio, La DLT-projekto, Nuklea industrio, Kiel oni decifris hieroglifojn, UNESKO kaj Esperanto, Problemoj de tradukado, Kio estas interlingvistiko.

Fine de la lernolibro troviĝas listo de gramatikaj finaĵoj kaj afiksoj kun afiksoidoj, solvoĵ de la ekzercoj kaj vortaroj Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanta.

Malovec

La 26-an de decembro 1989 forlasis niajn vicojn la multjara membro de nia Asocio kaj honora membro de ĈEA

D-ro Ing. Ludvík F r i t s c h

el České Budějovice. Li mortis en aĝo de 79 jaroj. Profesia kemiisto, inter la jaroj 1974 - 1982 li estis prezidanto de Scienc-teknika sekcio de ĈEA. Li aŭtoris fakajn vortarojn en etnaj lingvoj kaj kunlaboris ĉe granda teknika vortaro ĉeĥa-Esperanta (gis nun ne eldonita).

En Vendolí en Svitavy-distrikto la 13-an de decembro 1989 forpasis s-ano Ivo K o l o u c h

nur 18-jara. Li forlasis vicojn de nia Asocio kaj de ties junulara sekcio.

La 13-an de oktobro 1989 mortis en la aĝo de 82 jaroj longtempa membro de la E-klubo en Zlín s-ro Karel C h u d o b a . Li esperantistiĝis en la jaro 1928 kaj ekde tiu tempo gis lastaj jaroj de sia vivo li aktive laboris por Esperanto. Multaj, precipe pli agaj esperantaj amikoj certe povas rememori liajn interesajn kursojn kaj lian kapablecon de bona kaj rapida tradukado.

Al la familioj de niaj mortintoj ni esprimas nian sinceran kondolencan.

Finintoj de korespondaj kursoj de Esperanto en la fino de 1989

- ĉe instruisto Ing. Vlastimil Kočvara:

Tomáš K r a j c r , Krymská-19, 101 00 Praha 10 - Vršovice
Anna A u f o v á - P i n t e r o v á , Věteřov č. 105, 696 33
Eva V o j k ů v k o v á , 788 01 Oskava č. 176
Hana N o v o t n á , Stavařov bl. 99, 530 09 Pardubice-Polabiny
Jana K u b á č o v á , Rybníky 1212, 755 01 Vsetín 1
Vlasta C h m e l o v á , B. Šmerala 478, 533 41 Lázně Bohdaneč
Jiří J e l í n e k , 468 49 Kořenov č. 892
Dagmar P o l á c h o v á , M. Gorkého 43, 794 01 Krnov

- ĉe instruistino Eva Hoffmannová:

Marie P a t á k o v á , 9. května 171, Prštice u Brna
Ivana H a v l o v á , Gottwaldova 570, Hronov
Zuzana B e r n a r d o v á , Dolní Břežany 226
Lenka K o r t u s o v á , Augustinova 2058/26, Praha 4
Hubert K i n c l , Dolní Žandov č. 290
Ludmila P ř í h o d o v á , U Pergamentky 6, Praha 7

la korespondan kurson por progresintoj finis:

Ing. Antonín P í š t ě k , Modrá 153, Velehrad
František L i š k a , Ladova 6, Šumperk

- ĉe instruistino Helena Štruncová:

Šárka A g h o v á , Rezlerova 304, 109 00 Praha 10
Hana J í c h o v á , 384 72 Zdíkov 233
MUDr. Jitka Š v í b k o v á , Slunečná 14, 100 00 Praha 10
Růžena P r o k e š o v á , Mrštíkova 45, 100 00 Praha 10
Ing. Jana M i k u l o v á , Čechova 1542, 274 01 Slaný
Petra S o b o l o v á , Glowackého 545, 181 00 Praha 8

Al ĉiuj ni sincere gratulas! Bonvenon en Esperantujo!

En la radio...

Nacia Artisto Ota Sklenčka rakontis en Radio Praha la 8-an de januaro 1990 (inter 8,00 - 8,30) pri sia vivo de teatra artisto. Komence li priskribis, kiel ilia familio estis plena de Esperanto: lia patro Ota Sklenčka estis ĉefdelegito de UEA, lia filo kun la patrino helpis en la poresperanta administrado. Ota Sklenčka estas aktoro amata de nia tuta publiko.

Esperanto estas lingvo belega, ĉarmega. Kaj ne nur Esperanto estas bela, ankaŭ la esperantistoj estas belaj homoj... (Tial la totalismaj regimoj malfavoris ilin.) Tion deklaris en intervjuo pri muziko prof. Pavel Vondruška en Radio Praha (26.1.1990).

(Aŭdis J.M.)

loka vivo

Esperanto-rondeto "Amikeco" en Ĉeska Třebová

Kiel ĉiujare ankaŭ en la jaro 1989 la E-rondeto festis la jarfinan solenon jam pli frue - la 29-an de decembro. Kunvenis pli ol 70 personoj en salonego de "Unueca klubo de laboruloj". Inter ĉeestantoj estis gastoj el Poliĉka, Pardubice, Dobrouč, Rudoltice, Ĉerníkovice, Opatov kaj ankaŭ la prezidanto de ĈEA Ing. Petr Chrdle kun la edzino kaj amiko el Koreio - doktoro de orienta medicino kaj ĉefredaktoro de "La Espero el Koreujo" - Furamo Chong.

Muziko alternis kun scenetoj kaj konkursoj sub gvido de Jarča Klumparová kaj Jana Křížková kun helpo de Ing. Venci. Ĉiuj ĉeestantoj partoprenis konkurson je la plej bone elektita titolo de bildo. Alia konkurso estis nur por viroj. Ĉiu el ili povis ricevi titolon "La plej bona kaj vigla danculo". Al la programo kontribuis ankaŭ gastoj Jarmila Rýznarová kun filino kaj samideano Rezniček.

La plej grandan aplaudon ekaŭdis la gasto el Koreio, ĉar li salutis Ĉeĥoslovakion kaj gian "veluran revolucion" kaj ankaŭ nian arangon. Ankaŭ lia kanto kaj gitarludo estis eminentaj.

Dum noktomezo ĉiuj partoprenantoj ricevis kelkajn spritajn donacetojn. Multaj estis surprizitaj. Lau enketado en mia ĉirkaŭaĵo estis ĉiuj kontentaj.

Ĉis revido al fino de jaro 1990 en Ĉeska Třebová! (Zdenka Novotná)

HAVÍŘOV

Serio de niaj ĉiumonataj paroladoj pri vojaĝoj en fremdaj landoj plu daŭras. La 23an de nov. 1989 rakontis Jarmila Pastrňáková pri sia vizito de Kubo kaj renkontigo kun sia plumamiko en Havano. La 14an de dec. ni rememoris la 130an naskiĝdatrevenon de d-ro Zamenhof kaj invitis s-anon Drahomír Kočvara, prezidanton de la Paca sekcio de ĈEA, kiu parolis pri siaj pluraj vizitoj en Pollando, interalie ankaŭ pri Bjalistoko, kie estas konstruata granda tutmonda esperantista centro. Proksime de tiu urbo ekzistas tataraj vilaĝoj, kiujn li ankaŭ vizitis. - Oni povas bedaŭri, ke en nia lando okazis nur unusola Universala Kongreso (Prago 1921), sed jam ses sur la nuna pola teritorio: du en Krakovo: 1912 - tiam gi apartenis al Aŭstrio-Hungario, laŭdire ĉeestis eĉ Lenin, kaj en 1931; en Varsovio 1937, 1959, 1987; en Gdanĝk 1927 - tiam memstara germana urbo, nomata Danzig. - Dum ambau kunvenoj estis projekciataj diapozitivaj kaj ĉe la decembra tiuj klubanoj, kiuj kunlaboris ĉe arango de la "Festotagoj" de 20 jaroj de ĈEA, ricevis belajn dankleterojn, subskribitajn de direktoro de nia Kulturdomo kaj de prezidanto de nia grupo. AST.

Mladá Boleslav

La rondeto de Domo de Kulturo ROH ŠKODA naskiĝis la 17an de januaro 1989, kiam estis ĝia unua kunveno. Sed jam pli frue - la 8an de novembro

- okazis prelego de MUDr. Josef Hradil pri la "Internacia lingvo nuntempe". La prelego donis impulson al la naskigo de la rondeto. Komence la rondeto kunvenis unufoje en la monato kaj gvidis ĝin s-anino Naďa Vlčková. Nun ni kunvenas unufoje dum dek kvar tagoj kaj la rondeton gvidas Roman Heřman. Ni havas dudek membrojn. Ni kunvenas ciam en iu el la kunvenejoj de Domo de Kulturo, ciam marde en la para semajno kaj je la 17a horo.

La 25an de oktobro 1989 la rondeton vizitis Floréal Martorell kun siaj geamikoj (EUROKKA). La 10an de februaro 1990 estis en la Domo de Kulturo Balo de la junularo, en kiu partoprenis rokmuzika grupo TEAM kaj ĝia organiza gvidanto Stano Marček parolis kun la gvidanto de la rondeto kaj dediciis al la rondeto afison de la grupo. (Roman Heřman)

TRINEC

La E-rondeto de Domo de Kulturo arangas Amikajn Klub-Renkontigojn ciam la unuan sabaton en monato je la 16a horo en flava klubejo de la Domo de Kulturo. Okazis prelegoj pri vojago trans oceanon, pri la festivala Koreio, pri Jan Āmos Komenský en Nederlando, pri Elwagen - Kronach - Regensburg, pri Baltlandoj kaj Pollando kaj pri la plej granda falsistado de bildoj.

Ústí nad Labem

Tradicia antaŭkristnaska societa E-vespero omage al 130-a naskiĝjubilao de L. L. Zamenhof okazis sabate la 16-an de decembro '89 ekde la 18-a horo en la Domo de Kulturo en Ústí n. L. Festparolis doc. D-ro V. Novobilský pri la vivverko de nia majstro, kreinto de Esperanto. Sekvis nelonga kultura programo en la plenumo de solistoj de operdomo en Ústí n.L. En la dua parto de la vespero okazis komuna ĉetabla regalado, kantado de kristnaskaj kantoj kaj babilado. La etoso estis amuza kaj bela. (M. Snyčka)

ZLÍN

La membroj de E-klubo en Zlín kunvenadas ĉiulunde de la 16.30 ĝis la 19 horo. Dank' al bonaj kondiĉoj funkcias en nia klubo kurso por komencantoj kaj progresintoj. Krom tio kelkaj klubanoj preparas sin por asocia ekzameno. Ankaŭ en Domo de pioniroj okazas la kurso por infanoj, kiu estis pasintjare sufiĉe sukcesa. Samtempe ni klopodas akiri junajn esperantistojn por la Junulara sekcio de ĈEA, ĉar estas en ĝi multaj eblecoj por ili perfektigadi siajn lingvajn kapablojn en interesaj Esperantaj agadoj. Ni vokas junajn e-istojn el distrikto Zlín, petu informojn pri la Junulara sekcio (adreso: Klub Esperanto, PKO Burešov, 760 01 Zlín) kaj aligu al ĝi.

Fine de septembro 89 vizitis nian klubon esperantistino el Litovio, kiu estas jam kelkjara korespondamikino de niaj du anoj. Por kelkaj el ni estis la renkontigo kun s-ino Vilia la unua interesa okazo auskulti, kompreni kaj paroli kun eksterlandano. Venontan tagon post la vizito en PKO ni kune pasigis agrablan vesperon en "Kastela vinejo". (M. Pášmová)

ZNOJMO

EK en Znojmo aranĝis la 5an de dec. 1989 prelegon pri UK de Esperanto en Brajtono kun koloraj diapozitivoj. S-ino Ĥana Ilková parolis pri impresoj el sia unua partopreno en UK. Ŝi ankaŭ preparis la ekspozicion de bildkartoj kaj fotoj. La aranĝo tre plaĉis al ĉiuj klubanoj.

V. R.

Ostrava - Vítkovice

Al nova kurso en 1989 aligis 68 interesuloj, pro tio oni devis dividi la kurson en du partojn.

En la kadro de amikeco inter EK Vítkovice kaj Žilina la 15-an de novembro 1989 vizitis la klubon Vítkovice 4-membra delegacio el Žilina. La fotoj de D. Kočvara montras momentojn el la kunveno kaj konkurado de la du amikaj kluboj.



SEMINARIO PRI TRADUKADO KAJ INTERPRETADO

En Starto 4/89 ni anoncis, ke aŭtune 1990 ni aranĝos seminarion pri tradukado okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de la eminenta ĉeĥa tradukisto Rudolf Hromada. Nun ni alportas plurajn informojn.

La seminario okazos en la tagoj la 9a - 11a de novembro 1990 (vendredo-dimanco) en motelo Arkada en la urbeto Bučovice. La urbeto situas 37 km oriente de Brno (trajne el Brno en direkto al Veselí nad Moravou kaj al Trenčianská Teplá) kaj la motelo troviĝas sur la placo. Ni largigas la programon:

- a) beletra tradukado
- b) faka tradukado
- c) interpretado

Temos pri tradukado en Esperanton kaj el Esperanto. La partoprenantoj diskutos en tri diskutgrupoj, aŭdos prelegojn, per kiuj ili mem kontribuos, sed ĉefe intersingos opiniojn pri diversaj tradukproblemoj. Invititaj estas tradukantoj spertaj kaj ankaŭ komencantaj, kiuj nur preparas sin por tiu laboro.

Ĉi tiu artikolo estas verkata en januaro 1990 - laŭ la januaraj prezroj la partoprenkotizo (logo kaj mango) por enlandano estas 230 kronoj, por eksterlandano 355 kronoj, sed ĝis novembro povas la kondiĉoj kaj prezroj ŝanĝigi. Antaŭ la seminario ni sendos al interesitoj aligilon kun pagilo kaj tie estos skribita definitiva sumo.

Anticipan aliĝon sendu al: Miroslav Malovec, Charkovská 7/10,
CS-625 00 Brno, Ĉeĥoslovakio.

MM

Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto (januaro 1990)
Sendependa Lingvo-Institucio fondita de D-ro L. L. Zamenhof en 1905


Rezultoj de la komplementa balotado de kvar pliaj Direktoroj:

- Kolego Duc Goninaz: Sekcio pri gramatiko
- Kolego Ragnarsson: Sekcio pri literaturo
- Kolego Lo Jacomo: Komisiono "Landaj Esperanto-institutoj kaj AdE"
- Kolego Sherwood: Komisiono "Esperanto kaj informadiko"

La Sekcioj respondecas pri ĉiuj taskoj de la AdE, sed nur koncerne al speciala lingva fako. La Pleno diskutas la raportojn de la Sekcioj kaj alprenas decidojn per voĉdonado.

La Komisionoj plenumas aliajn taskojn ol la pure lingvajn: ili povas inviti al kunlaboro eĉ specialistojn el ekster la AdE. La Pleno aprobas la celon kaj funkciadon de difinita Komisiono kaj estas informita pri ties agado per specialaj raportoj.

Por la Akademio, ties Prezidanto,
D-ro André Albault



De la 19-a de februaro ĝis la 16-a de marto 1990 uzis loka poŝtofi-cejo en Stražnice porokazan E-afrankmasinstampilon por propagandi Espe-ranton kaj la Movadon. Temis pri unua E-afrankmasinstampilo uzata sur teritorio de Ĉeĥoslovakio dum nia historio.

La loka poŝtofiĉejo stampis per ĝi ĉiujn leterojn, kiuj foriris el la urbo, kio signifas, ke amasoj da homoj renkontigis per tiu ĉi manie-ro kun nia Lingvo kaj la Movado, kio kompreneble ne imageble efikis por nia Movado.

Temas pri ne tro multtekosta propagandilo. Detalojn ktp. je adreso: ESPERANTO, poŝtkesto 34, 696 62 STRAŽNICE.

-vlha-

Ĉi-jare pasas la 100-jara naskig-datreveno de la rusa blinda ver-kisto kaj esperantisto Vasiliĵ Ja. EROŠENKO (189-1990). Li verkis en Esperanto kaj la japana, krom la rusa, prelegis precipe en aziaj lan-doj. La sovetia poŝto rememoras lin per eldono de koverto kun lia kolo-ra portreto kaj libro-titoloj, kun esperanta kaj rusa teksto "Rusa so-vetia verkisto kaj klerigisto (1890-1952)."

/jm/

Okaze de la festoj Kristnasko kaj Nov-Jaro

mi kaj mia familio deziras al vi kaj ĉiuj geesperantistoj el ĈEA multe da suno, sanon, felicon en la vivo kaj sukceson en konstruado de paco kaj Esperanto.

Stanislavo Renn, Poznano, Pollando

Karaj Gesinjoroj,

Bonan Novan jaron, bonan jaron,
Sanan jaron, pacan jaron,
Pezan spikon sur la kampo,
Rugan pomon en gardeno,

Belajn florojn en la domo,
Bonan farton dum la jaro,
Dum la jaro 1990-a kaj por ĉiam!

Okaze de la Nova jaro sincere vin
ĉiujn gratulas Antanas Gvildys,
leganto de "Starto", Jurbarkas,
Litovio.

Esperanto en la lernejojn!

Lastmomenta sciigo.

Konekse kun la preparataj ŝanĝoj en la instruado de fremdaj lingvoj en la ĉs. lernejoj, kiam estas nuligota la rusa kiel deviga lingvo kaj envicigota kiel unu el devige elekteblaj fremdaj lingvoj, la prezidanto de ĈEA Ing. Petr Chrdle, CSc., turnis sin al s-ro ministro de lernejoj, junularo kaj korpedukado Prof. MUDr. Milan Adam, DrSc., kun petskribo pri prijuĝo de ebleco de enkonduko de Esperanto en la lernejojn kiel unu el pluaĵaj instruataj lingvoj. Al la letero forsendita la 13-an de decembro 1989 venis respondo la 17-an de januaro 1990. Ĝi tekstas jene:

Vicministro de lernejoj, junularo
kaj korpedukado de ĈSR
doc. d-ro Václav Šenkýř, CSc.

En Prago la 11-an de januaro 1990
N-ro SM 4 425/89-210

Estimata sinjoro prezidanto,

komisiite de la ministro de lernejoj, junularo kaj korpedukado de ĈSR prof. MUDr. Milan Adam, DrSc., al via letero de la 13-a de decembro 1989 ni sciigas:

La faktoj prezentitaj en Via rekomendo instrui Esperanton en niaj lernejoj estas iniciatoplennaj kaj estos prijuĝataj kaj konsiderataj ĉe preparo de projekto de nedevigaj fakoj en novaj instruplanoj por mezlernejoj, precipe gimnazioj.

Pri instruado de Esperanto en bazaĵaj lernejoj oni nuntempe ne pensas, en la futuro estos eble pripensi ĝian envicigon ankaŭ inter la nedevigajn instrufakojn.

Ĝenerale ni devas konstati, ke por enkonduko de Esperanto kiel unu el la elekteblaj lingvoj en niaĵaj bazaĵaj kaj mezaĵaj lernejoj ne estas dumkreita necesaj kondiĉoj - la instruplanoj, lernolibroj, mankas ankaŭ instruistaro, tial la envicigon ni prikonsideras nur en harmonio kun la kondiĉoj kaj eventualecoj, kiujn eblas sekurigi en la plej proksima futuro.

MLJK ĈSR rekomendas, ke la Ĉeĥa Esperanto-Asocio celkonscie orientu sin al gajnado de interesatoj pri Esperanto el la vicoj de lernantoj de niaĵaj lernejoj kaj pere de siaĵaj filioj kun la lernejoj rekte kunlaboru ankaŭ en la sfero de interesaktivecoj de la lernantoj.

Kun saluto

V. Šenkýř p. m.

Tiu ĝi letero al ni malfermas pordojn en la lernejojn, rekte admonas al tio. Per tio falas argumento de iuj lernejestroj, ke Esperanto estas dubinda kaj suspektinda afero. Necesas kapti la iniciatemon en unuopaj urboj kaj vilaĝoj en la manojn de esperantistoj mem.

Ĉi-sube ni aperigas la leteron en la ĉeĥa originala teksto:

Náměstek ministra školství, mládeže
a tělovýchovy ČSR
doc. dr. Václav Šenkýř, CSc.

V Praze dne 11. ledna 1990
Č. j. SM 4 425/89-210

Vážený pane předsedo,
z pověření ministra školství, mládeže a tělovýchovy ČSR prof. MUDr.

Milana Adama, Dr.Sc., k Vašemu dopisu ze dne 13. 12. 1989 sdělujeme:

Skutečnosti uváděné ve Vašem doporučení vyučovat esperantu v našich školách jsou podnětné a budou posouzeny a zváženy při přípravě návrhu nepovinných předmětů v nových učebních plánech pro střední školy, zejména gymnázia.

O výuce esperanta v základních školách se v současné době neuvažuje, v budoucnosti je možné uvážit jeho zařazení rovněž mezi nepovinné předměty.

Obecně musíme konstatovat, že pro zavedení esperanta jako jednoho z volitelných jazyků v našich základních a středních školách nejsou zatím vytvořeny potřebné podmínky - učební osnovy, učebnice, chybí rovněž kádrové zajištění, proto zařazení zvažujeme pouze v souladu s podmínkami a možnostmi, které lze v nejbližší budoucnosti zajistit.

MŠMT ČSR doporučuje, aby se Český esperantský svaz cílevědomě zaměřil na získávání zájemců z řad žáků našich škol o znalost esperanta a prostřednictvím svých odboček se školami přímo spolupracoval i v oblasti zájmové činnosti žáků.

S pozdravem

V. Šenkýř v. r.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 Prago 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Karel Franc, Jiří Hanousek (grafika arango), Ing. Vlastimil Kočvara, Miroslav Malovec, Jiří Patera (respondeca redaktoro) kaj Helena Štruncová. Presas Entrepreno de servoj de urbo Liberec. Transdonita al presejo 1990-03-20. Jarabono 36 CSK, por eksterlando 48 CSK aŭ 14 NLG, inkluzive de sendkosto. Abonantoj turnu sin al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Karel Franc, Jiří Hanousek (grafická úprava), Ing. Vlastimil Kočvara, Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor) a Helena Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18.3.85. Tiskne Podnik služeb města Liberce. Předáno do tisku 20.3.1990. Dohlédací pošta Praha 07. Snižovaný poplatek za poštovné povolen Ředitelstvím pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. 4. 1979.

Obracíme se na esperantisty v Krušných horách!

Již 10 let pořádáme v rámci družby s esperantisty v NDR /t.j. klub esperantistů ve Schwarzenbergu/ turistická setkání esperantistů "INTERNACIA TURISMA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ EN ERCMONTARO".

Přesto, že na tato setkání jezdí řada esperantistů i z jiných zemí, ne jenom z NDR a ČSSR, na české straně jsme dokonce mezi sebou přivítali i účastníky z Kanady, na německé straně až z Vietnamu, z našeho státu pak z různých koutů opakovaně přijíždí řady esperantistů, je až s podivem, že ze samotné oblasti Krušných hor, to kromě pořádajících karlovarských byli pouze s-ano Josef Holeček z Mostu a kdysi i s-anino Šultýsová z Chomutova. Z toho lze usuzovat, že v dalších místech Krušných hor a pod jejich svahy v údolí řeky Ohře na české straně už asi další esperantisté nežijí. Kdyby žili, jistě by buď přišli pozdravit naše setkání osobně, nebo by poslali aspoň pozdrav pro účastníky. Když nepočítáme Cheb, který už leží za Krušnohořím /ale při řece Ohři, která sbírá z Krušných hor většinu vod/, zjistíme, že kromě Karlových Varů a Sokolova, odkud nám přišel pomáhat při organizaci setkání jeden esperantista a stal se i členem naší ZO, nejsou v tomto území ani v Ostrově /a pamatujeme, že zde právě pořádali kdysi četná setkání esperantistů pod názvem "Amikeco trans limoj"/, ani v Chomutově, Kadani, Vejprtech, v Mostě, Litvínově, Teplicích - o menších městečkách ani nemluvě, už asi vůbec žádní esperantisté.

Mám nebo nemám pravdu?

Ozve se aspoň někdo z dřívějších nebo skrytých esperantistů? Přijede na příští setkání? Přispěje do programu o Krušnohoří i svým dílem, aby si účastníci těchto setkání nemysleli, že Krušné hory je jen ta část, která patří do okresu Karlovy Vary?

Za organizátory ITREE: Alena Klementová

V prohlášení přípravného výboru Strany evropského domu čteme m.j.:

Respektujeme a zabezpečujeme vysokou tolerantnost všech náboženských a filozofických humanních názorů. Budeme se snažit o nalazení jednotného jazyka, při plném respektování suverenity a vývoje národních jazyků.

Za tímto účelem chceme pomáhat zprostředkovat vzájemné výměny odborníků, populární a odborné semináře, navazovat kontakty se stejně smýšlejícími lidmi celé Evropy a celého světa.

Zájemci mohou bližší informace získat na adrese: Karel Šeda, Lozibky 52,
614 00 Brno.

**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

**Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979**